Tag' de l' tagoj

SALVE DIES



2. Al blinduloj / de Dio brilas Lum',
kiu savas / el tombo, el infer',
venkas morton, / ĉielon kun la ter'
repacigas.

3. Di' kunŝlosis / en malobe' kaj pek'
ĉiujn homojn, / ke Li al ĉiuj ni
helpi venu, / kaj per elsupra grac'
nin kompatu.

4. La saĝeco / de Dio, Lia virt',
la koleron / retenis kun mildec',
dum la mondo / jam estis sur la voj'
al abismo.

5. Resurektis / libere Krist' el mort'.
La homaron / restaŭris Li en Di'.
La perditan / ŝafidon portas Li
sur la ŝultroj.

6. Unuiĝas / anĝeloj kaj homar',
por ke sonu / el ĉi kreskinta Ĥor'
al la inda / triumfa Krist-Sinjor'
laŭd' eterna.

7. En la ĥorojn / ĉielajn miksu sin
harmonie / la eklezi-patrin',
kaj hodiaŭ / ĝoj-kantu ĉiuj ni:
Haleluja.

8. Maltriumfas / la imperi' de l' mort'.
Regu ĝojo, / triumfe festu ni.
Regu paco / surtere, regu glor'
en la altoj. Amen.

SALVE DIES • M: Albrecht Kronenberger 1980 / 2014 • latina T: eble de Adam de Saint-Victor, 12a jarcento • E: Albrecht Kronenberger 2008

Jen la gregoria melodi-versio el Antiphonale p. 366, 1011: